

enhavo

tra la lando

Alexis Otero Castellón

Ni rigardas antaüen

havano vokas

kultura panoramo

Maritza Gutiérrez González

El la zamenhofa trezorujo

pri movado senhalta

Héctor Jiménez Batista

Qu'revo aú realo?

Héctor Jiménez Batista

Alvoko al Esperanto-instruistoj

10

Alexis Otero Castellón

Ni iras al Camagüey

11

noticoj

Alexis Otero Castellón

Faktoj skribiĝas majuskle

12

Alexis Otero Castellón

Alia vizito de la Pastroj

14

Maritza Gutiérrez González

El la Seula kongreso


15

Dua Nacia Kongreso de KEA. Unua bulteno

16

havano, la 15-an de dec. 1994,
n-roj 1-4/94. aperas kvar foje
jare (sed ĉi jare, unufoje).
eldonas kuba esperanto-asocio,
pf.: 5120; 10500 havano, kubo.
telef.: 40-1364, fakso: 53 (7)
338729. Ĉefredaktoro: alexis
otero castellón. kunlaboris:
maritza quiérrez, héctor jiménez,
roberto molina, alberto
rodríguez. grafike aranĝis:
juan ramón rodríguez. prezo po
ekz: 0.50 cup (enl.), 2.00 nlg
aú 2 irk. (eksterl.), pagendaj
al kea-konto ĉe uea: keaux-u.
subskribitaj artikoloj esprim-
as la opinion de ties aŭtoroj.
ĉiuj rajtoj rezervitaj. repro-
duktado permesata. (bv. indiki
la fonton kaj sendu du ekzem-
plerojn al la redakcio.)

Kuba Esperanto- Asocio



estimataj:

kiam, kadre de la septembra estrarkunsido viciis punkto pri informado, mi devas konfesi ke mi iom tremis arbofolie. Tion motivigis la ne aperigo de tiu ĉi Oficiala Asocia Organo.

Estas ja vero ke de antaŭ tro da tempo, Avanco stagnas pro diversaj kialoj. Manko de papero, inko, taŭga ilaro, ktp, kauze de la speciala periodo.

Sugestite de la Nacia Estraro, mi decidis sargi la krucon. Sen tro multaj pretendoj, mi celis kompliladon de interesajoj por havi almenaŭ numeron resumantan la tutan jaron.

Nu, jen ni enmanigas ĝin al vi: ĉu vi ŝatas ĝin aú ne, ĉu vi trovas ion novan, estas via respondeco tien sciigi. Deziras al vi informi mi legadon, via redaktoro,

Alexis

Malgraŭ ĉio...

Ni rigardas antaŭen

Alexis Otero

La speciala periodo de ni pludaudras kontraŭ niaj revoj kaj esperoj. La insulo plej granda el la Antiloj ŝajne rolas ŝipon kies stirantoj manovras por malebligi la alfundon.

Vid-el-vide, la rifoj ne haltas minaci, malhelpi kaj samtempe kunteni naivulojn per diversaj allogaĵoj. Tiu kuradis jam kelkmoj kiuj forlasis la navicilon per flosaĵoj, en la kadro de senespera danco. Dame, la ankoraŭ ŝiparojn spronas la Sancelido, pri kiu ja eĉ plej rajtigita meteologiistoj ne kuraĝas antaŭprognosi ĉesiĝon.

La jaro 1994 elstaros eternie kiel la eble plej malfacila por la enlandanoj.

Meze de tioma fasko da problemoj kaj materiaj mankoj, Kuba Esperanto-Asocio festis sian 15an jarigiton. Ke ni ne dormas en "valendiluno" montris la serion da bone organizitaj aranĝoj kiuj efektiviĝis dum la jaro tra la tuta lando.

La unua el ili okazis en provinco Sancti Spiritus kiam januare imponis tie komitata kunsido, neniam forgeseble pro la atingitaj rezultoj, kaj pro la sindonego kaj oferemo far la lokaj movadanoj.

Kadre de la ekonomia situacio kreita pro la jam pli ol trijardeka usona blokado, amikaj manoj etendiĝis kaj la Asocio estis reprezentita en la Seula IJK kaj en la ILEI-Konferenco.

Sur la Ŝipo ni tenis plifirme la ferdekbarilojn kaj nenio baris la efektiviĝon de sukcesaj Seminario pri instruado, Labortago de E-medicinistoj, Centra Soleño kaj Kultura Vespero, tio ĉi okaze de la 15-a Jubilea Jaro. Estis krome faritaj dekoj da samkaj alisoecaj aranĝoj laŭlonge de la kariba kajmano.

Ke pinaranoj, ĉe la okcidenta ekstremo de la insulo, planite sed aventurplene,

vojaĝis al Santiago de Kubo, ĉe la ekstremo orienta, cele al ĝustejo en la tiea datrevena aranĝo, parolas pri la emo optimismi de nia tuta asocianaro. Kaj la santiaga-noj poste regrupokis.

La informa kampanjo, same plenusa, per partopreno en radiaj, televidaj kaj kulturaj programoj en preskaŭ ĉiu eka provinco, rolas konvinkigan termometron pri tio.

La malfrua apero de mia modesta informilo *Hoktuo*, estis iome tute kolizia sed ja fine devenis en nura ligilo inter la aliqintoj kaj la estraro. Ties hispanalingva versio por la gazetaro, resumas la perditan grundon post la ege sukcesa rikolto de la jaro 1990, rilate al informado. Pri tio, ni ja konscias ke, ankoraŭ ne estas eiterpitaj tiuj rimedo-ebloj kaj ke, certe ni devos starti pli agreseman kampanjon tiucelan.

Rilate al financoj, KEA ne fertas tiom malbone. Tamen, ni ne luksu perdi milimetrojn en tiu kampo. Endas je frapo la pordoj kie troviĝas kotozoj; ni nepre allogu kiel eble plej multajn homojn aligi al kategorio *Membro subtenanto...* sed ooste, honore, atenti ilin. Kelkfoje Funto da fazeoloj valoras pli ol tuno da diplomoj kaj kaj publikaj rekonoj.

Kaj jen kaj jen, niaj homoj fortuj kun tiom multaj taskoj surburĝo, vivigas la kuban provincon de Esperantio, kun granda entuziasmo kaj deziregoj.

Eble ni atentigu ilin pri la neceso persiste plialtigi ties lingvan nivelon tiel ke ni fine haltigu la disdialektiĝon, bedaŭrinde konstateblan. Legi kaj relegi, analizi artikolojn, kundiskuti, demandi sentime... Poluriĝi pli kaj pli, tiel kontribuus al forigo de tiu problemeto. Korespondado internacia ankaŭ ludas sian rolon en la flanko skriba kaj ortografia sed ĉar ni necesas parolantoj, ne gramatikantoj, la ciama instigo fokusigas al la verboj *paroli kaj praktiki*.

Nun, ni celas pli altan stupon, temas pri la efektivigo de la 2-a Kongreso de KEA en marto de 1996. Jam ni oleumas la motoron tiucele, sen troa bruo, sed kun la certeco ke, ankaŭ tion ni sukcesigos por daure rigardi antaŭen...

Malgraŭ ĉio.

havano vokas

La 11an de septembro la E-redakcio de Radio Havano Kubo fariĝis ses jaraga. La datrevenon festis la skipo kun granda plenuro pro la sefesa laboro por elsendi ĉiu dimanĉe duhororan programon. La skipo tre kontentas pro la regula ricevado de leteroj, poŝkartoj kaj periodaĵoj uzataj kiel informfonto. Interesitoj pri specifaj temoj sendu leteron al: esperanto redakcio, pf 6240, Havano, Kubo.

Jen la horaro kaj frekvencoj:

HORO UTC	M	KHZ	REGIONO
7.00	49	6195	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
15.00	31	9550	Tuta Ameriko kaj Karibio
19.30	25	11720	Eŭropo kaj Mediteraneo
22.00	25	11720	Eŭropo kaj Mediteraneo
23.30	25	11760	Tuta Ameriko kaj Karibio
	31	9550	
	49	6195	



Reagoj estas tre bonvenaj kaj necesaj por plua elsendado. Ni daŭre petas vijan subtenon kaj antaŭdankas pro la kunlaboremo.

Maritza Gutiérrez
la RHK-redaktorino

EL LA ZAMENHOFA TREZORUJO

Maritza Gutiérrez

Iel hazarde venis en miajn manojn tre maldika brošureto eldonita de Japana E-Libro Kooperativo. Bi enhavas kolekton de Zamenhofaj paroladoj okaze de diversaj kongresoj kiujn Zamenhof partoprenis en Bolonjo-sur-Maro, en Kambrigo, Dresdeno, Barcelono, Vašingtono, Antverpeno kaj Krakovic. La libreto enhavas kiel aldonajon la Deklaracion pri E-ismo kaj Homaranismo.

Ciu espeçantisto kiun interesas enprofundiĝi siajn konojn pri la celoj, ideoj kaj esenco de la E-ismo, devas traheci tiun kolekton de Zamenhofaj paroladoj. Bi atingeblas

pere de simpla prundo ĉe la biblioteko "Rufino López" de KEA. Dume, tre utilas koni kelkajn ideojn diskonigitajn de la Majstro jam en la fruaj jaroj de tiu ĉi jarcento, kiuj tamen daure montriĝas validaj kaj fundamentaj, se ne unikaj, en la agado de la Esperanto-movado.

Okaze de la Dua Kongreso Esperantista okazinta en Genevo, la 78an de aŭgusto 1906, Zamenhof esprimis: "Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neutra ĉi-samtempa fariĝos ĝi homoj amfeloj; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj

kultura panorama

ankad poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikidado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado".

En alia momento, kiam Z. energie defendadis la ideon esperantisman, li esprimis: "Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia aĉado cion idean, ni indigne distriros kaj prulicos cion, kion ni skribis por Esperanto, ni nenigos, kun doloro ja laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĝetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: 'Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi neniom komunan!'".

Estas vero, ke la tempoj de Z. estis tute aliaj, sed estas ankaŭ realo ke multaj

el liaj timoj kaj travivadoj restas aktualaj; daure la mondo militas, daure la homoj postmasas praktikajn profitojn, ĉar vivo per sia rajdanta ritmo butas homojn al celoj rutinaj kaj konsumismaj, por kio, do, esendas konkretaj rezultoj, fiam venkoj; kaj estas faktu ke ĉio ĉi negativo influas la evoluon de Esperanto, kiu devas konstante transalti cian obstakluon dismetitajn ie ajan de la vivo moderna.

Tamen, reirante al Zamenhof ni komprenas pli profunde la kialon de lia vivo, kiu estis vere altruista kaj lasis al ni heredajn uceblan por celui nostri, sed ankaŭ malbonaj. Do, vera esperantisto ne lasu sin vori de praktikismo, malgraŭ ĉio! Neniam, ni forgesu ke kiel Zamenhof mem diris: "Ciu ĝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimiĝas reciproke la korpojn de la homoj, et ne tial, ke ĝi alproksimiĝas la cerbojn de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimiĝas iliajn korojn."

kultura panorama

Konsideru al la granda reago kiu montriĝis nacijskale por ti tipa kurso, ni entuziasmitiĝis. Temas pri granda potencialo da homoj enkorpiĝontaj al la Asocio vivo. Ni cerbumu iomete kiuin problemojn ankoraŭ solvendas por sukcesiĝi ĝin estontece.

Unualoke, ni diru ke, kvankam ni ricevis plurajn leterojn petintajn informojn flanke de homoj interesitaj (549 ĝis decembro 1993), la fina rezulto ne estas tre kontentiga. El ili, nur 127 decidis officiale enskribiĝi en la kurso kaj do, membris

zonataj materialoj.

- 3.- Okazis problemoj, ankaŭ, kun la sendado de postgiroj tial ke pluraj kurieraj oficejoj ne konstatas sendi ilin kontraŭ 2,00 rukaj pesoj nur.
- 4.- La malbona funkcio de

Perkores

Ĉu revo

al la Asocio. Post analizi tiajn rezultojn kaj ties eblajn kialojn ni venis al la jenaj konkludoj:

- 1.- Multaj interesitaj estis duonmetivitej aŭ perdis la intereson, post ricevo de la enkonduka leciono, kiu ni sendas al ili tute senpage.
- 2.- Manko de suficiaj lerumanaterialoj niaflanke. Tio, de la komenco mem devigis nin prokrasti ĝian sendadon. La reago al la kurso estis multe pli granda ol ni atendis. Sekve venis kromaj problemoj kun la pressado kaj reproduktado de la be-

la posta plenigis multajn interesitajn, pro manko de reago al ilia peto flanke de KEA, dum ni ricevis nenion. Evidenciĝas ke la sektion ne atingis multaj korespondoj flanke de la interesitaj, kvankam ili certiĝis ĝian sendadon.

do senhalta

Aliflanke, ni bedaŭras la troan fidon je la ordinara posto. Ci lasta aspekto pen-sigis nin aliiqi la vojon por ke la PKK fakte frapu la pordon de cia intereso.

Sekve, la strategio por sub-

kiu respondedas pri ĝi, ne plu atentos rekte la opajn interesitojn. Ci kaze, la ILFI-reprezentanto ricevas per registrita posto, la konrespondadojn, sendotajn de Havano. Tiu persono disdonos ĉi tiu dissendos ilin laŭ okaze.

Ankaŭ la ILFI-reprezentantino enspezoj la tutan monun pro koncepto de loticioj (kaj lernomaterialoj) de la emskribiĝintoj. La homo sendes la koncernan proceduron al la Instrua Fako. Tie ankaŭ helpas solvi la problemon memcitan en la punkto 3.

Tiu proceduro stimulas la

onda kurso

aŭ realo?

Jiménez

cesiĝi niajn celojn estu tute alia. Tiel, kie ekzistas M-Filio ni decidis krei, reton de ILFI-reprezentantoj. Dia ĉefa okupiĝo estus roli peranton de la PKK en la teritorio, kaj en najbaraj lokoj kie ankoraŭ ne ekzistas filioj.

Tiel la Instrua Fako de KEA,

filiojn atente prizorgi trian korektan funkcian. Certe oni laboros en ĉiu municipio ĉeles al plialtigo de la nombrada eblaj aliqentoj.

Aliflanke, cia reprezentanto de ILFI diskoniĝos inter la PKK-kursanoj la monatan programon de aranĝoj, kiun ili rajtas partopreni por senti sin pli aktivaj rululoj de la Asocio vivo. Se ĉi tie funkciostrikelej esperante, ni povas certigi, ke la Perkoresponda Kurso transiroj firmas kaj sukcese, el neva idealo al kontenitipa kaj feliciga realo.

Alvoko al Esperanto-instruistoj

Héctor Jiménez

Cu vi konas ILEI? Bi estas la faka organizaĵo pri edukado kaj instruado. Bi havas tiian juran sidejon en Respubliko San-Marino, kaj sekciojn en granda nombro da land-

oj. La celo de ILEI estas edukado al la estimo de la homo kaj interkomprenejo inter la popoloj. Inter la taskoj por atingi tiun celon ni povas mencii:

ALIBILLO AL LA KUBA SEKCIO DE ILEI

Nomo kaj familinomoj de la instruist(in)o:

Privata adreso:

Konstanta identokartnumero:

Privata telefonnumero:

Laborejo:

Laboreja adreso:

Laboreja telefonnumero:

De kiam vi instruas Esperanton?

Cu vi nuntempe instruas?

Se jes, kiun nivelon vi instruas?

Nomo de la lernejo:

Adreso de la lernejo:

Sendu la plenigitan demandaron al:

Héctor Jiménez Batista
Landa ILEI-Sekciestro
postfako 5120
La-Habana 10 500

pri movado senhalta

- a) Unuiĝi instruistajn Esperanto-organizaĵojn en la mondo, cele al sistema laboro por la enkonduko de Esperanto en ĉiajn asociojn.
- b) Atenti, esplori kaj analizi la pedagogiajn problemojn en la instruado kaj edukado kaj labori por la solvo de tiuj problemoj.
- c) Organizi intersangojn de scertoj el la pedagogiaj sciencoj kaj praktikado por plibonigo kaj modernigo de la E-instruado.
- d) Organizi pedagogiajn konferencojn kaj laborkunvenojn.

La statutoj de ILEI rimarkigas ke ĉiu persono kiu rekonas la statutojn, okupigas pri edukado k. k. instruado, povas membrigi.

ILEI havas oficialan organon, *Internacia Pedagogia Revuo IPR*. Tiu revuo aperas kvarfoje jare, kaj ĉiu membroj ricevas ĝin. En nian lando jam oni fondis la Kuban ILEI-sekcion. La jarkotizo estos \$15.00, kaj inkluzivas la abonon al IPR. Rilate al la pago de la jarkotizo ni sciigos vin, kiom ni ricevos la informon flanke de ILEI. Novaj interesitoj, bonvolu plenigi la ĉi kune aligilon.

12a Komitatkunsido

Ni iras al Camagüey

Alexis Otero

La unua kunsido de la jaro, kutime vekas la atenton de multaj kaj laborigas ankaŭ plurajn. Krome, post la okazigo ĉi nepre fasas spurnoj neforgesebajn al la partoprenintaro.

Temas pri la Komitatkunsido, ĉi jare okazonta en urbo Camagüey. Gi estas pitoreska vilago situanta oriente de la ĉefurbo. Ankaŭ oni konas ĝin kiel urbo de la kručegoj.

Tiu urbo jam foje gastis la Komitateton. Tio okazis en la jaro 1989, sed ĝar estas politiko de KEA, stimuli la labordon de la plej elstaraj filioj, pasintjare la komitatanoj decidis transdoni la lerton unu plian fojon al tiu filio.

Ladislao García kaj la teamo de entuziasmuloj lin akompanantaj, meze de decembro raportis ke, preskaŭ ĉio estis preta por akcepti la komitatanojn kaj prezenti dignan aranĝon, malgraŭ la de tiam konataj malbonitancoj. Ĉar ĉiuj ili agadas stabile, venire al tiu esperantistejo, la Komitato plene fidas je la glata marso de ĉiu organizoj kaj alspecaj demandoj.

Se temi pri solidareco

Faktoj skribiĝas majuskle

Alexis Otero

Ni tre ŝojas publikigi la tekston de la ĉijara informa folio kiun eldonis KUUK. La teksto mem bildigas kio ĝi estas kaj kion ĝi celas. Tial, pluaj enkondukaj paroloj malmankas. Tamen, ni profitas la okazon por tutkore danki la opajn organizantojn, apogantojn kaj simpatiantojn de grupo demon-

trinta ke, kiam staras vere profundaj konscio kaj deziroj, nenio bremsas la komunikojn kaj komprenejan interhomon. Nepras sendi specialan saluton al la amike tenera kaj abele senlaca Sino Ana Montesinos de Gomis, kiu okupigas pri la ĉefaj respondecoj en la kadro de la grupo.

KUUK: Kubanoj al Universalaj Kongresoj

KUUK estas iniciato kiu komenciĝis en februaro, pasingtare, en Londono (Britio) por, kiel ĝia nomo diras, eligi kubanojn ĉeesti Universalajn Kongresojn.

Ni ja scias ke multaj aliaj landoj ankaŭ havas malfacilaĵojn kaj ke ankaŭ ili meritas helpon, sed ni deci-

dis koncentriĝi en nur unu kaj elekti Kubon pro la jenaj kialoj:

Ni konsideras ke en la kazo de Kubo ne temas pri individuaj homoj kiuj ne havas la rimedojn por vojaĝi, sed sed ke la tuta lando estas punata politike, ekonomie kaj finance pro la fakto ke

noticoj

ili -malgraŭ la pli kaj pli gravaj malfacilejoj kaŭzitaj grandparte de la daŭra kaj krueла bojkoto de Usono, la nuna preskaŭ ne ekzistanta komerco kun la eks-Sovetio kaj aliaj orienteŭropaj landoj, kaj la malintereso de la mondaj registaroj ankaŭ kaj energie prave demandas per si mem la rajton memdecidi pri sia sendependependeco kaj sia estantecon premoj el eksterre. Bedaŭrinde tio ŝajnas troa provoko farita de malforta lando al la preskaŭ tiopova norda najbaro, nome Usono.

Aliflanke, Kubo havas tre fortan kaj viglan esperantiston kiu tre efike kontribuas per trafa kunlaboro al la antaŭeniro de Esperanto certe en sia propra lando sed ankaŭ kaj tre rimarkinde en la movado Ĝenerale.

Do, KUUK vidas kiel sia tasko ne simple doni al la kubanoj, sed multe pli precize ebligi al ili kontribui al la tutmonda Esperanto-Movado por la profito de ni ĉiuj.

Se ankaŭ vi konsentas kun niia celo, ni esperas ke vi, laŭ via ebledo, ankaŭ kontribuos al ĝi, ĉu per financa helpo, ĉu disvastigante ĝin inter viaj korespondan-

toj, en via loka aŭ nacia Esperantu-gazeto, ktp. esperante ke iun tagon la ekzisto de KUUK jam ne necesos.

-Por pliaj informoj: kontaktu KUUK
tel. (44)-(0)71.736.2046
Ana Montesinos de Bonis
B2 Waterford Rd., London
SW6 2DR, BRITIO.

-UEA dadre kolectas monon por KUUK, ĉe la konto "kuuk-j".

-En Britio, ni havas novan bankkonton:
KUUK/bankkontnr. 716.8564
Lloyds Bank plc.
Walham Green Branch,
472 C Fulham Rd.,
London SW6 1DB, Britio.



Alia vizito de la Pastroj

Alexis Otero

Solidareco estas multflanka kaj eble, estontece, Kubo povas esti la lando kiu akumulas plian sperton pri solidarecaj aferoj. La fakto ke dum pli ol tridek jaroj la lando eltenis senhoman blokadon, ne perdinte la dignon kaj senhalte konstruasian specialan socian projekton, estas io, kion pluraj personoj kaj institucioj en la mondo, ne nur agnoskas, sed ankaŭ deziras koni kaj partopreni en la helpajn misiojn.

De eŭropaj infanoj, kiuj sendas lernejajn ilojn por siaj kubaj homologoj, pasante tra medikamentoj, papero, transportiloj ĝis biblioj, la solidareco al Kubo montris al amikoj kaj malamikoj de la insulo kiom edifas la sinteno de unu popolo kaj kiel tio undigas volojn, sentojn kaj praktikajn sintemojn.

Kaj ĉi okaze, ĉio dirita estas konforma kun la lasta

vizito kiun faris al Kubo la *Pastroj por Paco*, organizajo de usonaj religiuloj, kiuj defiantaj ĉiujn malpermessojn starigitajn de la usonaj administracioj, periodo vojaĝas al Kubo portantaj solidaran kargon je amo kaj espero

Kiel kutime, la delegacion kapis pastro Lucius Walker, kiu je la alveno al Havano, esprimis al la kuba gazetaro ke ankoraŭ daŭras la apogo de la organizajo por la lukto de la insulo kontraŭ la usona blokado. Krome, li esprimis optimismon pro la migraj interkonsentoj subskribitaj inter Havano kaj Vašingtono.

Ci okaze, la pastroj demandis pri la efiko de la lastaj aranĝoj de ekonomia premo adoptitaj de la Blanca Domo, kiel la malpermesso ke kubanoj rezidantaj en usono sendu monon al ties familiinoj en la insulo.

Lucius Walker, Direktoro

El la Seula Kongreso

Maritza Gutiérrez

de la Projekto Pastroj por Paco, kiu jam organizis kvar karavanojn de homa helpo, klopodos komunikis siajn spertojn al la nuna usona prezidanto, al registaraj funciuloj, kongresanoj kaj ankaŭ al la usonaj eklezioj.

La episkopo José Antonio Ramos, konsideris tre pozitivaj la primigrajn interkonsentojn kiujn subskribis reprezentantoj de la du landoj, sed ankaŭ li konsideras solvenda tio, kion li nomis ĉefan problemon en la ambaŭflankaj rilatoj: la fino de la blokado.

La opinio de Episkopo José Antonio Ramos, ankaŭ subtenas la ceteraj membroj de la projekto, kiu krome, opinias ke en Usono oni ne scias ke, malgraŭ la ekonomiaj malfacilajoj travivataj de la karibia insulo, ekzistas amasa sektoro de la loĝantaro kiu apogas la proceson regantan en la lando.

Pastroj por Paco, unu plia organizaĵo en Ameriko kaj en la mondo, kiun impresas la eltenado de la kuba popolo antaŭ semmerita puno, konsideras ke, tagoj venos en kiu nur unu registro devigos al Kubo la malamatan blokadon... Kion di faros tiam?

Kelkaj gravaj deciditaj voĉdonitaj en la 79a UK-o estas interalie ke elektiĝis nova generala sekretario de UEA Mark Fettes, ankaŭ estrarano pri Informado kaj Eksteraj Rilatoj. Li devos plenumi la postenon ĝis Tampere, Finnlando kiam UEA elektos novan estraron kaj komitaton. La antaŭa generala sekretario Ian Jackson rezignis pro profesiaj devoj.

La komitato de UEA akceptis du novajn Honorajn Membrojn, ili estas sinjorino Ada Fighiera-Sikorska kaj serpo Raymond Bonin kies biografioj estis diskoniitaj.

Internacia Ekonomia Fakgrupo (IKEF) estis akceptita kiel aliiginta faka asocio de UEA dum la Asocio de Verdulaj Esperantistoj (AVE) kaj Eŭropa Klubo estis akceptitaj kiel kunlaborantaj fakaj asocioj.

Ankaŭ estis decidite ke la UK-o de la jaro 96 okazos en Prago, Ĉehio kaj la kongreso 97 en Adelajdo, Aŭstralio. Krome, la temo de la 80a UK-o en Tampere, Finnlando estos: "Ni, la popoloj -unu mondo ĉi disaj eroj". Gi estas ligita al la 50-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj. En ĝia traktado oni konsideros formojn de internacia kunlaboro, homajn rajtojn kaj pacon.

UNUA BULTENO

DUA NACIA KONGRESO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO 7-9 DE MARTO 1996

En 1996 la kuba ŝefurbo farigos renkontigejo de landaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Kuba Esperanto-Asocio invitas vin partopreni ĉian Duan Nacian Kongreson kiu spite al pluraj malfaciladoj devenantaj el la krizaj tempoj evidentigas la viglecon kaj vivantecun de la kuba esperantistaro.

La kongresa programo enhavos tradician interkonan vesperon kaj kulturklerigan programon, eksposiciojn, rondtablajn diskutojn pri kernaj temoj de la movado kaj aliaj arangoj ligitaj al la kuba realo. En la oficiala programo estas planite okazigi kunsidon kun reprezentantoj de la Amerika regiono.

KEA organizos antaŭkongreson por eksterlandaj kongresontoj, kiuj havos la Sancon turismi, viziti interesajn centrojn ligitajn al la kuba esperantistaro, partopreni jaran kunsidon de la komitatanoj asociaj okazontan inter la 5a-6a de marto kaj ankaŭ renkontos samideanojn el la tuta lando.

Al ĉiuj samideanui ni petas frue anonci sin kaj plenigi ĉi-kunan aliĝilon. Aliĝintoj ricevos kompletan programon kun sciigoj pri la evoluo de la kongresaj preparlaboroj.

Kuba Esperanto-Asocio zorgos pri la kongresanoj kaj jam antaŭfaras demarsojn por atingi favorajn kondiĉojn rilate al gastigado kaj manĝoj.

!KEA invitcas vin varme etosi en Havano!

ALIĜILO

Rv. resendi al : KUBA ESPERANTO-ASOCIO
posta fako 5120 CP 10500
Havano, Kubo

Mi deziras partopreni ĉia kongreso _____

Mi interesigas pri la antaŭkongreso _____

NOMO: _____ FAMILINOMO: _____

KORESPONDADRESO: _____

LANDO: _____ PROFESIO: _____